
kvaronjara esprimilo

de la junularo esperantista de nord-ameriko



n-ro 1

1972

# JEN bulteno


La Reĝo de UMP
JEN VERA ATESTAĴO PRI RENVERSEMA KONSPIRO EN NIA LANDO.
ŜENDUBE ĜI ESTAS AGADO DE LA CENTRO IDISTA ASOCIO (C.I.A) — RENVERSEMA ORGANIZO.
LIA REĜA MOŜTO ESTAS PAPERTIGRO
ONI SENKAPIGU ILINI SENKAPIGU LA ŜTAT-MALAMIKOJN. SENKPIGU LA IDISTOJN !!! !!!
KAJ ĈU LA VOLAPÜKISTOJN ANKAŬ?
JES. SENKAPIGU LA VOLAPÜKISTOJN. SAVU LA ŜTATON.
KAJ ANKAŬ LA INTERLINGVISTOJN?
SENKAPIGU LA INTERLINGVISTOJN.
KAJ ĈU LA OKCIDENTALISTOJN?
JES.
KAJ LA ANGLISTOJN?
LA ANGLISTOJN?
LA PLEJ RENVERSEMA KONSPIRO ESTAS LA NEAMO DE TURISTMONO!
LIA REĜA MOŜTO ES PAPERT
$$$

## Sugestojn, ni petas

La estraro de JEN petas (petegas!) ke la membroj donu al ni iujn ajn sugestojn kiujn vi havas pri programeroj, vojaĝoj, eldonaĵoj, specialaj planoj, ktp, ktp, ktp rilate al la kunvenoj por la junularo en Portland. Ni ne fuŝu pri tio! Ni havos gravan ŝancon por montri nin kiel seriozaj kaj kapablaj homoj kaj Esperantistoj, aŭ, ni honestu, kiel fuŝuloj. Kion ni elektos? Ankaŭ, ni ne nur atentu pri ni mem-- gejunuloj venos de aliaj landoj, elspezanta multe da mono kaj tempo. Ili venos parte pro tio ke ili estas scivolemaj pri Usono; ĉu ili ne devus havi bonan akcepton ĉe ni? Ĉu ili ne devus povi porti hejmen bonan rememoraron pri Usono kaj usonaj Esperantistoj?

Ni, la anoj de JEN, havas gravan respondecon, kaj ni povos havi grandan plezuron rezulte de la kongreso-- sed nur se ni kiel eble plej rapide aktiviĝos. Pro tio ke agado komencas per ideoj, ni ĉiuj petas al vi ke vi pripensu la aferon kaj sendu al ni iun ajn ideon, kiuj vi havos. Elkoran dankon!

## El la mondo de internacia komerco
(traduko el Reader's Digest)

Por ke junaj Usonanoj povos pli bone reprizenti niajn firmaojn eksterlande, jam havantaj bonan konoj de la kulturoj de la landoj en kiu ili laboras, la Universitato de Dallas (ŝtato Texas, Usono) ofertos en Junio novan diplomon, la Magistro de Internacia Administrado. Por perlabori la diplomon, la "fremdlanda eksterulo" devas labori dum almenaŭ unu jaro ekster Usono por fremdlanda firmao, kaj sukcesi je la Princeton Foreign Language Examination (Fremdlinga Ekzameno de Princeton Universitato) en la lingvo de la lando al kiu li iros.

Honeywell, Texas Instruments, Republic National Bank of Dallas, kaj pluraj aliaj firmaoj jam esprimis intereson pri dungi la novajn "eksterulojn".

## Kvankam ja estis sufiĉe...

Geedza paro en Romo ne ricevis permeson doni al sia deka infano la individuan nomon "Basta" ("sufiĉas"). La juĝisto diris, "'Basta' ne estas nomo. Maksimume, ĝi estas respegulo de la mensostato de la gepatroj."

## Biografio (?) de Samuelo Vilhelmo Yorty, urbestro de Losanĝelo, Kalifornio (Usono)
(Notu: "Yorty" elparoliĝas "jorti")

Kvankam Saĉjo Jortio ne povis ĉeesti sian naskiĝon pro tio ke li havis tiam negocon en Alĝero, la okazo estis granda ĝojo por la cetero de la familio. Ili tuj konstatis ke la bebeto estos politikisto, ĉar kiu krom politikisto kuraĝus foresti dum tiel grava momento?

Dum la infaneco, Samuelo ĝuis normalan, sanan, usonan vivon. Kiam li ne ekbruligis la katidojn de la najbaroj, li injektis limonadon en la

vejnonjn aŭ ŝtelis monon de la patro por aĉeti ĉokoladajn kvazaŭcigaredojn. Kiam li atingis la aĝon 21, li balotis por Imperiestro Vilhelmo de Germanujo por Prezidanto de Usono, kaj tiel komenciĝis sian politikan karieron.

Kiel juna viro li ĵuris plibonigi la urbon kiun li amas. Sed la urbo kiun li amis, Parizo, estis miloj da mejloj for, do Samuelo devis klopodi plibonigi Losanĝelon. Unue li elektiĝis al la Urba Konsilistaro kaj enuigis la aliajn urbokonsilistojn per mokimitoj de la filmaktoro Humphrey Bogart. (Oni notas frue la influon de Hollywood, parto de la urbo kiu havas la kromnomon "Kinofilma Ĉefurbo de la Mondo".) La juna S-ro Jortio havis multe da ambicio, kaj multaj personoj sciis ke li kandidatiĝos al la urbestro baldaŭ. Kaj fine la okazo venis. La tiama rubestro forrabiĝis de banditoj de najbara lando, kaj Samuelo estis la sola konsilisto kiu volis anstataŭi lin. Do en Aprilo, 1961, Samuelo Jortio fariĝis Urbestro de Losanĝelo kiam li faris sian inauguran paroladon en Novdelio.

"Unue mi volas certigi vi ĉiujn," li anoncis al la ŝvitanta, laca homamaso kiu preterpasis lin, celante religian festenon, "ke mi neniam uzos mian oficon por antaŭenigi miajn proprajn politikajn ambicionjn." Kelkaj el la homamaso oscedis.

En 1966 Urbestro Jortio decidis famigi sin plu, kaj kandidatiĝis por la guberniestreco de Kalifornio. Li havis absolute neniun eblecon malvenki. Li malvenkis. En 1970, li denove kandidatiĝis por la sama oficio. Denove li havis neniun eblecon malvenki. Li malvenkis. Sed oni devas noti ke li havis kelkajn triumfojn. En 1969, Urbokonsilisto Tomaso Bradley kandidatiĝis kontraŭ la urbestro, kaj ŝniris anoncostriojn sur ĉiu garaĝpordo en la urbo. Bradley akuzis ke Jortio malŝparas la monon de la enloĝantoj. Responde al la akuzo, la nesubigebla urbestro donis mokimiton de Humphrey Bogart kaj reelektiĝis "terglite" kiel diras usonaj politikistoj.

Sed la ronkvoĉa urbestro ankoraŭ ne estis finita ludi kun nia pacienco. Frue pasintjare, li anoncis ke li "kredeble" kandidatiĝos al Prezidanto de Usono. Li diris ke li unue ekzamenos sian fortecon en la antaŭelekto en la ŝtato New Hampshire, kies kvardek-tri enloĝantoj certe elektos nian karan urbestron. Kelkaj civitanoj sugestis ke li ekzamenu sian fortecon en Rodezio aŭ Liĉtenŝtejno aŭ alia loko ekster Usono. Eble li sekvos tiun konsilon. Fakte, oni nun demandas ĉu S-ro Jortio eble salutos Prezidanton Nixon en Pekino. Sed kion ajn Samuelo Jortio faros, ni almenaŭ scios ke ni ne devas toleri lian ĉeeston en Losanĝelo dum tro longa tempo; li ŝajne preferas esti en iu ajn alia urbo. (Ĉu en tio, mesaĝo sin kaŝas?) Tial, la balotantoj lin tiel fidas, ke li ĉiam reelektiĝos ĝis kiam Losanĝelo estos granda, fuma, putra marŝo.

de Tiĉjo Fallis
Kalifornio

(Noto de la redaktoro: Post S-ro Fallis verkis tiun ĉi kontribuaĵon, S-ro Jortio fakte ekstariĝis sian kampanjon.)

Esperanto kaj Kalkulmaŝinoj
de Kevin Carmody

Ĝenerala uzado de rapidegaj kalkulmaŝinoj ne estas ankoraŭ akirita en granda arco, sed ĉi tie ĉe Dartmouth College ni feliĉe sukcesas tion en malgranda areo, nome la kolegio mem. Pro mia granda intereso pri kalkulmaŝinoj kaj programado, kaj ankaŭ pri Esperanto, mi decidis igi la maŝinon helpi min solvi kelkajn problemojn Esperantajn.

La ĉefa maŝino ĉi tie estas Honeywell G635, kiu povas sumigi milionojn da okcifraj numero dum nur unu sekundo. Alligitaj al ĝi estas 230 finaĵ-skribmaŝinoj ĉe la kolegio kaj ekstere en tuta Nov-Anglujo. Iu ajn sidanta antaŭ iu finaĵ-maŝino povas funkciigi la kalkulmaŝinon. Ĝis 150 personoj povas funkciigi ĝin samtempe. Tio eblas per la procedo "tempdividado," laŭ kiu ĉiu uzas la ĉefmaŝinon dum ono da sekundo por solvi sian taskon kaj uzas la finaĵ-maŝinon daŭre por ke li entajpu aŭ la maŝino eltajpu.

Ies tasko ordinare estas "programo". Tio simple estas aro da instrukcioj kiun komprenas ambaŭ la programisto kaj la maŝino. Oni povas instrui al la maŝino per kelkaj "lingvoj," ekz. la bonkonataj FORTRAN kaj COBOL. Krom tiuj Dartmouth havas sian propran lingvon, BASIC, kiu iel similas al Esperanto, car gi estas pli simpla ol la aliaj lingvoj, sed ankoraŭ tiel forta kiel ili.

Pro facila uzebleco kaj facila skribado de programoj, ĉirkaŭ 90% el la studentoj lernas uzi la kalkukmaŝinon, kaj 1000 el la 3700 studentoj uzas ĝin po tago. Do, scio pri la maŝino estas preskaŭ universala, kaj programado ne helpas nur al malgranda grupo, sed al ĉiuj, kiuj bezonas tion.

Ĉar la kalkulmaŝino povas konservi milionojn da vortoj da informo kaj fari taskojn per tiu informo, kaj ĉar persono sidante ce finaĵ-maŝino povas respondi al demandoj de la kalkulmaŝino, estas nature skribi programon kiu ekzamenas ies scion pri Esperantlingvaj vortoj. La ekzamenato elektas tiajn vortojn kiajn li volas provi. Ĝenerale oni respondas per vortoj Esperantaj aŭ donitaj vortoj anglalingvaj. La maŝino decidas ĉu la persono entajpis ĝustan respondon: se jes, li pluiras; se ne, la maŝino redemandas ĝis aŭ li respondas ĝuste aŭ li indikas ke li tute ne scias. Post ol li trairas ĉiujn vortojn, li povas reprovi tiujn al kiuj li ankoraŭ ne respondis ĝuste; se eĉ tiun fojon li ne ĝuste respondas al ili, li povas reprovi denove, kaj tiel plu, ĝis kiam li respondas ĝuste al ĉiuj vortoj en la listo.

Tiaj programoj estas multavantaĝaj por instruantoj. Kiam mi instruis al klaso ĉi tie, mi uzebligis la programon al la studentoj, kaj oni povis facile havi ekzamenon iam ajn, se oni deziris.

Alia programo kiun mi skribis estas por ne-Esperantistoj. Tiu programo enkondukas la uzanton al Esperantismo kaj komencetas instrui la lingvon mem. Ĝi ĉefe estas elpresado informanta kun nur kelkaj demandoj. La celo de la demandado estas monti la simplecon de Esperanto, ĉar eĉ humila maŝino instruas ĝin.

Tiun programon povas uzi iu ajn kiu uzas la kalkulmaŝino, kaj ĝian ekziston anoncas trareferencoj en la maŝino.

Multe mi ŝatus ricevi respondon de tiuj kiuj interesiĝis pri tiuj aferoj kaj tiaj maŝinoj.

(Tiuj gelegantoj kiuj deziras ricevi la du programojn, kiujn faris S-ro Carmody (t. e., tiu por enkonduki Esperanton kaj tiu por kontroli vortliston), bonvole skribu al li ĉe:
405 Wheeler
Dartmouth College
Hanover, N. H. 03755.
Li sendos al vi la programon kiun vi deziras, aŭ eĉ ambaŭ programojn, tajpita(j)n de la kalkulmaŝino.)

Respondoj al la stupvortaj enignoj

| | |
|---|---|
| koko | kato |
| kuko | koto |
| suko | poto |
| suno | poŝo |
| luno | puŝo |
| | muŝo |
| | muso |

Gratulojn al tiuj, kiuj ĝuste solvis la enignojn!

Semajno de Internacia Amikeco
(lasta plena semajno de februaro, ĉi-jare la 20-27-an de februaro)

Estas aĉeteblaj tre belaj salutkartoj desegnitaj de s-anino Thelma Liphard en Indiana, kaj afiŝoj ankaŭ desegnitaj de ŝi. La kartoj vendiĝas je du por kvin cendoj, kaj ilin oni povas uzi fiere por saluti niajn multajn gesamideanojn kaj ne-Esperantistajn geamikojn tra la mondo.

La afiŝojn vi povas aĉeti por du cendoj. Ili estas ankaŭ belaj, kaj taŭgus por montri en fenestroj de butikoj, kaj sur bulten-tabuloj en universitatoj, lernejoj, preĝejoj, bibliotekoj, laborejoj, ktp.

Oni povas mendi la kartojn kaj afiŝojn de:
S-ro Kenneth Thompson
P. O. Box 663
Houston, Texas 77001
au
S-ino Roan Orloff Stone
504 North Fifth Street
Gallup, New Mexico 87301

Aliaj salutkartoj estas aĉeteblaj de la redakcio de JEN-Bulteno. Ili estas de du specoj: unu havas desegnaĵon de japanaj origamaj gruoj (pac-simbolaj figuretoj) kaj la poemon "Kredu aŭ ne dredu" de Hilda Dresen. La alia havas desegnaĵon de "stelfloro" kaj folioj, kun la poemo "Plenigu ĝin per amo" (Llénelo de amor") de Amado Nervo, en la originala hispana kaj kun Esperantlingva traduko. La prèzo por ĉiu karto estas 15¢.

Respondo al John Fulton
Kara S-ro Fulton:

Eĉ dum la legado de via artikolo mi denove ekscíis ke mi praveĝis fariĝi Romkatolikino(...).

Necesas klarigi ion pri la religio: la Morala Leĝo estas absoluta kaj sendependa de tio, kion oni efektive faras. Do, la fakto ke "eĉ la koncernaj eklezianoj malobservas ilin" ne refutas la realecon de la Morala Leĝo. Multaj homoj, plue, asertas ke la religio estas nur privata afero. Via artikolo helpas pruvi ke ĝi ne estas--aŭ ne estu!-- tiel. Se la homoj sekvas vin, aŭ la genetikajn manipulistojn, aŭ

B. F. Skinner, aŭ la komunistojn, aŭ eĉ la t. n. Bonajn Paganojn, la mondo baldaŭ fariĝos infero. Mi alkutimiĝis al ...artikoloj (kiel la via) en la Mensa-periodaĵoj; parte pro tio mi eksiĝis. Sed en Mensa (organizaĵo por inteligentuloj) estas nature paroli pri "supereco". Ĉu ankaŭ en Esperantujo?

Nun mi kredigas min, ke mi estas vi: malfacila klopodo ĉar mi eĉ ne konas vin. Tamen, mi devas supozi ke vi estas tute serioza. Do:

Jen mi estas: S-ro John H. Fulton. Strange, ke mi havas nomon, ĉar mi estas ano de la homaro, kiu estas biologie--do ĉiel-- "nur specio en la bestaro". Eble, ĉar mi havas iun nenormalaĵon aŭ difekton, estus prefere, ke oni estus decidinta, ke mi ne rajtas vivi. Tamen, mi nun vivas; kaj kvankam mi foje pensas pri la sinmortigo (kial? Prof-o Skinner pruvis ke la "vera konscio" estas iluzio; same pri la individua valorsento), mi ne kuraĝas. Cetere, mi eble estas, malgraŭ ĉio, genetike akceptebla; niaj genoj altigos "la genetikan stokon de la tuta homaro". Nur la homa specio gravas, ne la unuopa, individua homo. Do mi, John H. Fulton, ne gravas.

Tamen, la gentika revolucio ne estas finiĝinta; kaj mi enamiĝis kaj edziĝis. Kompreneble, ni uzis la rimedojn de kontraŭcipo kaj abortigo. Tamen, ni decidis (!) ke ni deziras (!) gefilojn. Do nia edzino estas graveda. Kompreneble, ni ambaŭ agnoskas, ke "pro la inteligenteco de la homa specio, eblas elekti la infanojn kiuj rajtas vivi ĝis matureco". Kaj ni ne apartenas al tiu "oni" kiu "povas bone fari tiajn decidojn," alnenaŭ ne pri niaj propraj infanoj. Kiam nia edzino (kiu ankaŭ havas nomon) naskos la bebon, ni senhezite akceptos la decidon de la "oni". Kompreneble, ni ne ĝenas nin pri la "tiom vidkompreneble stultaj" dognoj de la "religioj". La patrina instinkto estas nur biologia fenomeno; la gepatra amo ne ekzistas. Kial, do, ni sentas nin tiom malgajaj?

Ellen A. Lewis

Motivoj

de Matthew McElroy

Estas unu aspekto de usona kulturo kiu vere estas tre stranga. Tio estas, ke kiam ajn nia registaro faras ion, iu homo, al kiu neniu diris la motivon de la agado, neniam povus diveni tiun motivon. Ekzemple, tiu, kiu vidis la novan ekonomian agadon de nia Prezidanto suspektus aŭ 1) ke ni tiel ĝuis la duan Mondmiliton kun Japanujo ke ni nun deziris ripetin ĝin, aŭ 2) ke General Motors, la Chase Manhattan Bank, kaj Dow Chemical nun bankrotiĝas. Jen la vera motivo: La Prezidanto kredas ke la mondo tre ĝuas surprizojn, kaj li deziras feliĉigi ĉiujn. Ĉu vi ne entuziasme atendas la venontan novaĵon?

Aŭ, se vi petas alian ekzemplon de tiu ĉi nacia trajto, mi donu ĝin nun. Iu, kiu vidas tion, kion Usono jam faris en Vjetnamujo, kredus aŭ ke la sola maniero per kiu nia lando povas forĵeti nian nedeziritan DDT'on estas faligi ĝin sur Vjetnamujo, aŭ eble ke Ngujen Van Thieu estas la frato de Richard Nixon. Sed, tiuj kredoj pri la supre menciita ideo nur montrus nescion pri la vero (kiel esprimata, kompreneble, de la registaro). La vero estas ke ni militas

nur por ke la Sudvjetnamoj povas liberi elekti sian propran registaron. Komprenebl̂e, se la libera popolo de Sudvjetnamujo libere decidas havi nur unu kandidaton, ni ne faru ion pri tio-- ni neniam, neniam entrudiĝu en la internajn aferojn de alia lando. Speciale de Sudvjetnamujo! Do, vi nun komprenas, ke la agoj de nia registaro estas ĉiam logikaj, ĉu ne?

\- - - - -

Se vi ne okazigos ĝin, ĝi ne okazos!

\- - - - -

ĈU VI?

S-ro Sergio Docal deziras starigi grupon da personoj kiuj ĉeestos la UK en Portlando kaj kiuj deziras lerni kelkajn kantojn en Esperanto por grupkanti tie. S-ro Docal sendos al vi surbendigitajn kantojn al tiuj personoj kiuj interesiĝas pri lia ideo por ke ili povas lerni la kantojn antaŭ ol alveni al la UK.

Ĉu vi deziras peti pli da informoj de S-ro Docal, aŭ kunlabori kun li? Se jes, nepre skribu al li ĉe la jena adreso:
5021 Twenty-fifth place N.
Arlington, Virginia 22207

KORESPONDEMULOJ...

Baldaŭ alvenos la Semajno de Internacia Amikeco. Post ĝi venos la UK. Ĉu vi havos amikon aŭ amikinon eksterlandan kun kiu vi povas kunĝui tiujn plezurajn travivaĵojn? Se ne, kial ne elekti unu el la personoj kiuj aperas en ĉi tiu rubriko por esti via korespondamiko? Ili ĉiuj deziras skribi al juna usonan-(in)o. Eble vi?

Gyula Miŝi, Budapest XI, Novak Gyula 7, Hungarujo.
17-jara instrumentista lernanto. Li ŝatas legi, interesiĝas pri turismo, fotografado. Lernas la germanan.

Barbara Jarguz, Mystowice, ul. Wyspianskiego 14-9, Pollando. 16-jara knabino kiu deziras korespondi post fundamenta kurso.

Jerzy Andrzejaczek, Leork, ul. M. Konopnickiej 6/13, Woj. Gdanskie, Pollando. 19-jara junulo, kun junulinoj inter 16-19 jaroj pri moderna vivo, kun junulo pri astronaŭtiko.
Wieslaw Beyrowski, Lebork, Postkesto 57, woj. Gdanskie, Pollando. Junulo kiu deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn, esperantaĵojn, insignojn, ktp.

Jania Maria de Souza, Rua Presidente Quaresma 541, Alecrim - 59000, Natal, R. N. Brazilo. 15-jara knabino.

Raimundo Carlos Silverio Freire, Rua Romualdo Galvao 28, Tirol 59000, Natal, R. N. Brazilo. 15-jara knabo.

Istvan Gaal, Keszthely, Muzeum ut. 5, Hungarujo. Studento, "esperantogvidanto," deziras koresp. kun junulino.

S-ro A. T. Brockbank, 25 Poplar Ave., Chelmsley Wood, Birmingham B27 7RD, Anglujo. 24-jara, 20-jara edzino, du idoj. Interesoj: politiko, mondaferoj, lingvoj, sciencaferoj, usona vivmaniero.

Ŭatanabe Saĉio, 25, Tenjin-co 2-ĉone, Huĉuŝi, Tokio 183, Japanujo. Mezklasa lernanto kiu ankaŭ instruas E-on al komencantoj. Serĉas korespondamikojn por siaj gestudantoj; kelkaj el ili partoprenos la UK en Portland.

Rita Vidugiryete kaj Nijola Zambaite, Liepyno 16-6, Vilnius 34, Litovio, Sovetunio. Ambaŭ estas 16-jaraj. Korespondos E-lingve kaj litove. Interesiĝas pri litova kulturo.

Edilson Dias de Araujo, Rua Borborema, 1103, Alecrim, Natal, R. N. Brazilo. 16-jara fraŭlo.

Maria Coretti Pereira Felipe, Rua Belo Monte 561, Rocas, Natal, R. N. Brazilo. I2-jara junulino.

Francisco das Chagas Oliveira da Silva, Rua Souza Pinto 1088, Lagoa Sêca, Natal, R. N. Brazilo. 17-jara junulo.

Jen Via Mondo

Tra la mondo, multaj specoj de bestoj estas en treege danĝeraj situacioj, kaj baldaŭ malaperos se iu organizaĵo ne helpos ilin. Tio tutcerte ne estas novaĵo--fakte vi jam legis ĝin multfoje. Sed la fakto ke ĝi ne estas freŝa novaĵo ne plimildigas ĝin por la persono kiu ŝatas bestojn kaj respektas ilian rolon en la sistemo de naturo.

Multaj bestoj estas endanĝerigitaj pro tio ke sia vivloko aliiĝis aŭ sia vivmaniero ne plu eblas. Aliaj bestoj malaperas pro tio ke oni tro ĉasas ilin, aŭ por distro aŭ por profito.

Evidentas ke tiuj ĉi problemoj nur tre malfacile solviĝos, kaj nur post longa tempo. Ĉu ni do devas rezignacii pri la formorto de multaj bestospecoj?

S-ro Gerald Durrell, la angla verkisto kaj naturisto, kredas ke tio ne devas esti, kaj agadas por savi la endanĝerigitajn bestospecojn. Lia bestĝardeno sur Ĵerzejo, Manikaj Insuloj, (inter la Unuiĝinta Regno kaj Francujo) specialiĝas pri tiuj bestoj kiuj baldaŭ suferos estingiĝon en sia loĝloko. En tiu unika bestĝardeno, rizulte de granda elspezo da mono, tempo, kaj amo, S-ro Durrell kaj sia personaro prizorgas la bestojn kaj kreas etoson en kiu ili reproduktas. Kiam estas sufiĉa stoko da iu besto en la bestĝardeno, oni arangas ke la troaĵo sendiĝu al aliaj bestgardenoj.

Rezulte de la laboro de S-ro Durrell, kiam la landoj kiuj nun estingas siajn sovaĝajn bestojn fine provizos protekton kaj loĝlokon por ili, tiuj bestoj ankoraŭ ekzistos tra la mondo.

Tiu bestĝardeno meritas la subtenon de ĉiuj, kiuj havas intereson pri naturo kaj la ĉiam-malkreskanta nombro da bestoj en la mondo. Ĉu vi estas unu el tiuj personoj? Se jes, ne perdu la okazon; kontaktu la bestĝardeno de S-ro Durrell kaj petu informon pri membreco. La kosto estas malalta kaj la afero gravas por nia mondo--por via mondo!

Skribu al Jersey Wildlife Preservation Trust, Les Augrès Manor, Trinity, Jersey, Channel Islands.

Pli, pli, pli da artikoloj estas bezonataj por JEN-Bulteno. Esprimu viajn ideojn! Priparolu viajn interesojn!

Rakontu viajn spertojn! Montru viajn opiniojn! Sendu viajn artikolojn kaj leterojn (kaj tradukojn, kaj ktp., ktp.) al JEN-Bulteno. Ne timu; pli bonas esprimi laŭ via lingvo-nivelo kiel ĝi estas nun anstataŭ tro modeste silenti kaj perdi praktikon. Ĉu ne?

Gratulojn!

Al Thomas Goodman de Baltimore, Maryland. Antaŭnelonge, artikolo pri li kaj lia intereso pri Esperanto (kaj pri E-o mem) aperis en la grava usona ĵurnalo, The Sun. S-ro Goodman ankaŭ vekigas intereson pri Esperanto en Baltimore per siaj paroladoj en lernejoj. Tia sindonemo donas fruktojn.

o o o o o
o o o o


Kia donaco por li (ŝi)?

Hmmmmmmm........

Ĉu vi ŝatus doni al korespondamik(in)o aŭ alia Esperantista amiko en- aŭ eksterlanda malgrandan donacon por festi la novjaron, Semajnon de Internacia Amikeco, la naskiĝtagon, ktp.?

JEN la solvo de via problemo. Pardonu la vortludon, sed JEN-Bulteno povas esti tre bonevena donaco por Esperantisto, juna aŭ maljuna, eksterlanda aŭ usona.

Ĉu vi akordas? se jes, sendu la nomon kaj adreson de la persono kun ĉeko por US$2.00 al la redakcio. Kontraŭ tiu sumeto via amiko ricevos JEN-Bultenon por unu jaro, kaj ricevos specialan karton por anonci vian donacon.




Redakcio, JEN-Bulteno
ĉe Erik J. Felker
731 Birmingham Road
Burbank, CA 91504
USONO -- U. S. A.

FIRST CLASS

[redacted]

ADDRESS CORRECTION REQUESTED